

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
GIROMUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15V.FR.

F.151291

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

ŜIA NEPO.

Ofte mi pensis, ke ŝi estas la plej soleca homo en la tuta mondo. Eĉ por mi, kuracisto, por kiu la tuta vilaĝo estis kvazaŭ malfermita libro, ŝi restis sekreto. Ŝi loĝis en la lasta domo de la vilaĝo, tuj apud la marĉo, kiu tie etendiĝis. Malgranda pensio kaj de temp' al tempo poŝtmandato de ŝia nepo, kiu migris ie en la mondo kiel maristo, gardis ŝin kontraŭ morto pro malsato.

Estis en iu aŭtuna tago, jam iom krepuskiĝis, kiam la vilaĝa leterportisto alparolis min.

„Ĉu mi momenton povas paroli kun vi, doktoro?”

„Certe,” mi respondis, „envenu, Willemsen.”

„Jes,” li komencis, „rilatas al S.ino Wilsen. Ŝi ne estas tute sana, sed ŝi mem ne volas konscii pri tio.”

Fine mi do interkonatiĝos kun la maljunulino.

La saman vesperon mi iris al la malgranda dometo kaj frapis sur la pordon. S.ino Wilsen, maljuna kaj kurba, aperis, kaj rigardis min malafable.

„Kion vi deziras?” ŝi demandis.

„Willemsen, la leterportisto, petis min viziti vin, S.ino.”

Ŝajnis, ke la nomo Willemsen havas magian povon. Ŝi venigis min en la ĉambron kaj prezentis tason da teo. Dum la maljunulino pretigis la teon, mi rigardis ĉirkaŭe. Sur tableto, apud la fenestro, kuŝis fasko da leteroj. Ĉiu el ili portis multkoloran eksterlandan poŝtmarkon. La virino sekvis mian rigardon. Rideto vidiĝis sur ŝia vizaĝo kiam ŝi rimarkigis: „Jes, tiuj venis de mia nepo Karlo. Li estas maristo sur ŝarĝoŝipo.”

„Ĉu?” mi respondis, „do vi tie havas karan legaĵon!”

„Se mi nur povus legi ĝin. Kiam mi estis juna, ne restis al mi

tempo por lerni. Mi devis labori sur la kampo. Sed Willemsen, la leterportisto, laŭtlegas ilin por mi, ĉiufoje kiam li alportas novan leteron.”

Hazarde mi do trafis delikatan lokon en ŝia animo. Ŝi eĉ donis al mi du leterojn, kiujn mi ankoraŭfoje devis laŭtlegi. Unu pritrakis uraganon en la Flava Maro, la alia rakontis pri la flava febro en Haitio; ambaŭ estis tre interesaj kaj zorge skribitaj. Ĉi tiu nepo devas posedi bonan intelekton kaj paron da bone observantaj okuloj !

Tiel ni sidis ankoraŭ kelkan tempon, ĝis mi devis hejmeniri. Ŝi afable salutis min kaj ĝojis, kiam mi promesis baldaŭ reveni kun kelkaj ilustritaj libroj, por ke ŝi povu vidi, kiel aspektas malproksimaj landoj.

En la sekvintaj monatoj mi regule vizitis la maljunulinon. Kune ni rigardis la bildojn ĉe la vojaĝrakontoj de Sven Hedin, foliumis la mondatlason kaj relegis la leterojn de ŝia nepo.

Komence mi facile povis resanigi ŝian malvarmumon, sed vintre ŝia sanstato videble malboniĝis. Mi do tute ne miris, kiam Willemsen iun tagon avertis min : „Doktoro, S.ino Wilsen estas ege malsana!”

Post malpli ol kvaronhoro ni ambaŭ staris antaŭ ŝia lito. La maljunulino havis gravan pneŭmonion kaj mi tuj telefonis flegistinon.

La malsanulino pene ridetis kiam ŝi vidis min. Malrapide ŝi diris: „Doktoro, mi esperas, ke baldaŭ finiĝos. La nura, kiu ricevos ion, kiam mi estos morta, estas Willemsen, tiu bona, kara knabo. Li estis por mi kvazaŭ filo, li laŭtlegis miajn leterojn. Li ĉiam demandis, ĉu li rajtas havi la poŝtmarkojn, ĉar li havas kolekton da ili. Mi diris, ke li heredos ilin de mi. Nun estas preskaŭ tempo...”

La sekvintan tagon sinjorino Wilsen mortis. Vespere Willemsen venis al mi kaj diris, ke li iris al la dometo por forporti la poŝtmarkojn.

Mi mire rigardis lin. La virino apenaŭ mortis, kaj ĉi tiu viro, kiu montriĝis tamen tre bona, iris por forporti sian heredaĵon !

„Ĉu vi nuntempe havas nenion por pripensi krom la poŝtmarkoj de la mortinta virino?” mi demandis malvarmege.

Li rigardis min kun stranga mieno kaj respondis : „Tiu poŝtmarkoj apartenas al mi. Nun mi povas rakonti la aferon al vi. Komprenu, Karlo, ŝia nepo, antaŭ tri jaroj malsaniĝis kaj mortis. Okazis ie sur la Pacifika Oceano. Mi sciis, ke la maljunulino tut-

kore amis sian nepon, kiu sole al ŝi restis, kaj kiam venis la letero de la ŝipestro, mi ne kuraĝis laŭtlegi la teruran sciigon. Depost tiu tempo mi, kiam mi povis malhavi kelkajn guldenojn, skribis leteron kaj sendis poŝtmandaton al ŝi, dirante, ke ili venis de la nepo. Kiam mi bezonis eksterlandan poŝtmarkon, mi prenis ĝin el mia kolekto.”

't Zand (Ned.)

DNALKOLB.

ANGLUJO VOKAS GEJUNULOJN.

Vizitu la junularan tendaron ! Dum la semajno post la Universala kongreso okazos tendaro por esperantistaj gejunuloj (aĝlimo 30 jaroj) ĉe bela tendarkampo apud Ipswich en Orientanglujo.

Jen bona ŝanco intimiĝi kun kampara kaj provinca vivo en Anglujo meze de esperantistoj.

La tendaro estas organizita de la BEA en la kadro de la Post-Kongresaj Aranĝoj. Kunlaboros la loka Esperanta Grupo kaj Skolta Esperantista Ligo. Ĝi estas partoprenebla de iu ajn esperantista junulo, ĉu kongresano aŭ ne. **La kosto por unu semajno estas £ 1.0.0.** Ĉi tio enkalkulas la manĝaĵon. Apartaj, malkaraj ekskursoj estos aranĝataj por laŭdezira partopreno.

Eksterlandanoj, Ipswich estas facile atingebla, estante proksime de Harwich kaj oni esperas, ke vi multnombre anoncos vin por sukcesigi la tendaron.

Oni anoncu sin al : S.ro C. G. Goldsmith, 30-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo.

Venu multnombre !

SCIIGOJ DE LA OFICEJO „ESPERANTO ĈE LA INSTRUADO”.

S.ro L. W. v. Loon, nederlanda inspektoro de la unuagrada (elementa) instruado, konsilas al la junaj geinstruistoj, kiuj devas zorgi por la evoluo de l' estontaj generacioj, lerni ĝustatempe Esperanton. Sinjoro inspektoro opinias, ke Esperanto en la daŭro de la venontaj kvardek jaroj fariĝos la lingvo de l' internacia trafiko de la popoloj diverskontinentaj.

Por komencantoj.

PRI LA SOLDATO, KIU KUIRIS DOLĈAN KAĈON EL HAKILO.

Soldato revenis malsata el la milito. Jen li ekvidis dometon, flanke de la vojo. En tiu dometo loĝis sorĉistino, sed la soldato ne timis, kaj kuraĝe eniris.

„Panjo,” li diris, „mi estas malsata; donu, mi petas, ion por manĝi.”

„Kuŝiĝu do en tiu angulo,” diris la sorĉistino, kiu ŝajnis sin surda.

„Ĉu vi estas surda?!” kriis la soldato.

Denove la sorĉistino diris : „Nu, bone, kuŝiĝu en tiu angulo, soldato!”



Tiam la soldato ekkoleris. Per la sabro li batis sur la tablon kaj kriegis : „Manĝon mi postulas. Manĝon!!”

„Sed nenia manĝaĵo estas en mia domo, kara soldato.”

„Tuj kuiru por mi kaĉon!”

„Sed tute nenion mi ja havas por kuiri!” ĝemploris la sorĉistino.

„Nu, donu al mi la hakilon, kiu staras en tiu angulo, tiam **mi** kuiras kaĉon por **vi!**”

Jen la maljunulino fariĝis scivola. Kiel la soldato sukcesos en tio? Kuiri kaĉon el hakilo? Tion ŝi nepre eksciis!

Do, ŝi donis al li la hakilon; la soldato ĝin metis en la kaldronon, enverŝis akvon kaj pendigis la kaldronon super la fajro. Kiam la akvo murmuris kaj ekbolis, li gustumis la kuiradon, sed ne, ĝi tute ne bongustis!

„Estas necese aldoni iom da avena grio kaj tiam ĝi nepre bongustos,” li diris.

Kaj la maljunulino, scivola, alportis grandan sakon da avena grio. La soldato ĵetis la tutan enhavon en la kaldronon kaj kiam denove la manĝaĵo brue ekbolis, li gustumis ĝin duafoje.

„Hm, jes, bone,” li diris, „jes, jes, bone, sed ni nepre aldonu ankoraŭ iom da butero!”

Tuj la maljunulino donis al li grandan pecon da butero. Kelkan tempon la soldato kirlis kaj miksis la ingrediencojn kaj poste li diris : „Jen, preta! Nu, panjo, metu sur la tablon la telerojn, panon kaj salon! Kaj kune ni manĝos certe kun granda apetito!”

Kaj ili manĝis, manĝegis! Ĉion ili formanĝis. Neniam antaŭe la sorĉistino manĝis tiom dolĉan kaĉon !

„Sed,” ŝi diris, „kiam do ni ekmanĝos pecon da hakilo?”

„Ho jes, komprenu do,” diris la soldato, „via hakilo ne jam estas sufiĉe kuirita! Morgaŭmatene, en alia loko, mi denove kuiras ĝin. Tiam mi ja ankaŭ havos ion por la matenmanĝo.”

Kaj metinte la hakilon de la sorĉistino en sian tornistran, li ekmarŝis al vilaĝo najbara.

Ĉu tie li denove kuiris tian dolĉan kaĉon? Mi bedaŭras, sed tion mi neniam eksciis.

JEKKE VAN DIJK.

DANKEMO.

Malriĉa laboristino estas en malsanulejo; ŝi suferas pro paralizo de la laringo. Ŝi ne plu povas paroli; ŝi ploregas ĉar ŝi estas malriĉa kaj estas neeble ke ŝi laboru. La ĉefa kuracisto atente zorgas pri ŝi, sed longtempe ĉio restis sama. Dum iu nokto, kiam, kiel kutime, ŝi provis movi sian langon, vorto eliris. Ŝi parolas, ŝi estas savita! Kion nun fari? Sendube ŝi alvokos siajn kamaradinojn en la malsanulejo kaj ŝi diros al ili : « Mi parolas!” Ŝi diros tion por ke ŝi mem aŭdu la tonon de sia voĉo! — Ne! — Ŝi silentas.

La 6a, la 7a horo sonoras. La gardistinoj alportas al ŝi la nutraĵon; ŝi silentas. Sed, ofte, metante la kapon sub la kovrilo, ŝi amuziĝas pro sia resaniĝo per kelkaj mallaŭte parolataj vortoj.

Fine, la pordo malfermiĝas, la kuracisto eniras kaj proksimiĝas al la lito. Tiam, kun rideto kaj larmoj :

„Sinjoro,” ŝi diras „mi parolas, sed mi volis gardi mian unuan parolon por vi, kiu savis min!”

Trad. J. LEPACHELET (Somain, Franc.). Lau LEGOUVE.

HONESTECO.

La dajako (tribo en la insulo Borneo) estas vere la homo plej honesta kiu vivas sub la suno. Dum la rikolto la domoj estas neniel gardataj, kaj la loĝantoj vivas nokte kaj tage sur la rizkampoj; neniam oni ŝtelas ion.

Iam mi banis min en la riverego Saribas; mi forgesis mian sapopecon sur la bordo de la rivero. Mi jam estis malproksime kiam mi ekvidis dajakon, senspira, alportante la sapopecon. Li rapidis atingi min, ĉar la sapo ja apartenis al mi!

Laŭ E. MJOBORG.

KION LA MONDO SULDAS AL HINUJO.

Persikon, abrikoton, oranĝon, teon, kaj pli ol dudek kampkulturajn produktojn.

Silkon, porcelanon, kompason, pulvon, lakon, paperon, presarton per moveblaj presliteroj.

La unuaj, la finoj sciis konstrui pendpontojn, makadami la vojojn, komponi nenaturajn sterkojn, plimultigi la kolorigilojn, la metalajn kunfandaĵojn, utiligi la naturan lumgason, uzi la sendolorigilon, ktp.

Sen ili kaj sen ilia historio de post 25 jarcentoj, ni sciis neniom pri la historio de la plej multaj el la aliaj popoloj en Azio.

Trad. J. LEPACHELET (Somain, Franc.).

„PROPAGANDO“.

Abstinencula societo aranĝis grandan propagandan manifestacion tra la urbo.

Kelkajn horojn poste la fileto de konata advokato venas hejmen kaj rakontas, ke ankaŭ li partoprenis en la manifestacio.

„Bone!” diras la patro. „Kaj ĉu vi ĝuis?”

„Kompreneble,” krias la knabo entuziasme, „estis ja agrablege!”

„Kion do vi faris?” informiĝas la patro.

„Ho,” respondas la knabo, „ili surmetis sur mi tre eluzitan kostumon, kaj paron da ŝuoj, tra kiuj trapikis miaj piedfingroj, kaj tiel mi portis tabulon, sur kiu staris : „Mia patro estas drinkemulo.”

DRESITA.

„Ĉu via hundo estas obeema?”

„Tion mi kredas. Kiam mi vokas : „Ĉu vi venas, aŭ ĉu vi ne venas?” ĝi venas, aŭ ĝi ne venas.”

TROVITA.

Maljuna sinjorino : Ĉu vi perdis la vojon, bubeto?

Ploranta bubo : Ne, sed mi trovis straton, kiun mi ne konas!

ENIGMO.

En korbeto estas 5 pomoj. Kiel disdoni ilin al 5 personoj, tiel, ke unu pomo restas en la korbeto?

Solvo : Unu persono prenas pomon kun la korbeto.

LA „SPERTULO”.

Sinjorino : „Ĉu mi momenton povus paroli kun la ministro de terkulturo?”

Referendario : „La ministro estas momente tre okupita. Pri kio vi deziras paroli kun li?”

Sinjorino : „Mi volas peti lian konsilon. Mi havas geranion kiu estas mortonta!”

EN LA JUĜEJO.

Juĝisto : Finfine vi do konfesas. Kial vi ne tuj faris tion? Vi havigas al ni multan ne-necesan laboron.

Ŝtelisto : Ho, do ankaŭ vi malŝatas labori!

VIGLA RESPONDO.

Eksterlandano, por inciteti finon, demandis al li .

„Kiel koloraj estas la angloj?”

„Blankaj.”

„Kaj la hinoj?”

„Homokoloraj.”

Ĉu tiu respondo ne estas samtempe naiva kaj lerta?

Trad. J. LEPACHELET (Somain, Franc.).

PERSISTADO DONAS REKOMPENCON.

Estis iam ĉina studento, kiu pro daŭra malsukceso forĵetis siajn librojn. Jen li vidis malriĉulinon, kiu frotis sur ŝtono pecon da fero por fari el ĝi kudrilon.

Tiu ĉi ekzemplo pri persistado instigis lin al nova fervora studo kaj li fariĝis unu el la plej grandaj scienculoj de Ĉinio.

BLEKI.

Per ĉi tiu ĝenerala vorto ni nomas la parolon (krion) de la bestoj. Sed la diversaj bestoj diversmaniere blekas, kaj tial ni uzas ankaŭ diversajn vortojn, kiuj formiĝis el la imitado de la bestaj sonoj. Jen tiaj vortoj :

La hundo bojas;	la abelo zumas;
la kato miaŭas;	la rano kvakas;
la bovo muĝas;	la serpento siblas;
la ĉevalo henas;	la grilo ĉirpas;
la porko gruntas;	la turto kveras;
la koko kikerikas;	la kolombo rukulas;
la kokino klukas;	la cikonio klakas;
la kokido pepas;	la strigo ululas;
la urso grumblas;	la pigo babilas;
la lupu hurlas;	la kukolo kukuas;
la elefanto trumpetas;	la mevo krias;
la muso cincas;	la najtingalo kantas;
la korvo grakas;	la vanelo kvikas;

(La Praktiko, majo 1937.)

Onklino : Se vi kisas min Joĉjo, vi ricevos frankon.

Joĉjo : Tio ne sufiĉas. Kiam mi trinkas mian hepat-oleon mi ricevas la saman sumon !




Instruisto : Karlo, ne grimacu tiel strange. Ĉu vi eble imitas min?

Ĉevalo kaj azeno disputas pri la demando kiu el ili pli valoras.

„Mi estas de malnova, nobela deveno!” diras la ĉevalo.

„Kion faras tio?” diras la azeno. „Vin, ĉevalojn, en mallonga tempo anstataŭos aŭtomobiloj, sed azenoj ĉiam restos en la mondo!”

NI ĜOJAS TRE...



1. Ĉiu knabo staras flanke de knabino, lia dekstra mano tenas ŝian maldekstran. Malrapide ili iras 4 paŝojn antaŭen (2 paŝojn en ĉiu takto).
2. Ili riverencas unu al la alia kaj manfrapas.
3. Turnas al si reciproke la dorson, rigardas trans la ŝultron unu al la alia kaj manfrapas.
4. Brak' en brako ili trankvile marŝas antaŭen (4 paŝojn en ĉiu takto), poste kiel en 2 kaj 3.
5. Flank' al flanko la geknaboj dancas, tenante la manojn kaj svingante ilin antaŭen kaj malantaŭen.
6. Ili maltenas la manojn kaj unufoje dancante turnas sin.

Multajn melodiojn ni ricevis por la „Kanto de la Groet-tendaro”. Ĉar estas inter ili tre belaj, estas malfacile elekti. Ŝajnas al ni plej bone, ke ni aŭdigu la diversajn melodiojn en Groet, kaj ke la kunveno mem decidu!

Korekto. Legu sur paĝo 165 de la antaŭa No : 1. ...forigajn... anstataŭ mal-longajn.

LASTA ADMONO.

Sur la kovertoj de la eksterlandaj abonantoj ni ankoraŭfoje presigis la daton, je kiu finiĝis iliaj abonoj. Al la abonantoj en Nederlando ni prezentos kvitancojn post 15 aŭgusto.

JUNULARO, FORMU RONDON !

Junularo, formu rondon !
Gloru sonu kanto
Al Ideo Zamenhofa,
Lingvo Esperanto !

Junularo, formu rondon !
Firme harmonian !
Kun devizo en la koro :
„Amu lingvon nian!”


Junularo, formu rondon !
Hor' decida venos,
Pro laboro tiel bela
Vin Estonto benos.

Riga (Latvujo).

Ludmila JEVSEJEVA.

Ankaŭ ĉe ĉi tiu kanto ni volonte havus viglan melodion. La muziko en la kantaro ne tre konvenas al la vortoj. Do, kiu helpos???

? ENIGMOJ



a, d, d, e, l, l, n, n, n, n, n, o, o, o, o, o, o,
o, o, o, p, r, ŝ t. t. La vortoj signifas, hori-
zontale : 1. konsonanton; 2. prepozicion; 3.
elstaran osteton en la buŝo; 4. mondurbon;
5. ion pezan; 6. membron; 7. konsonanton.
Oni legu la nonom de la mondurbo ankaŭ
vertikale.

L. (Ned.).

T. B.

2. **Ĉenenigmo** : Serĉu 4 vortojn, tiajn, ke la lasta silabo de la antaŭa vorto estu la unua de la dua, ktp. La lasta silabo de lasta vorto estu la unua silabo de la unua vorto. Tiel : 1-2 : malpuraĵo; 2-3 : ŝtofo; 3-4 : malgranda pezilo; 4-1 riparejo por ŝipoj.

Hilversum (Ned.)

G. FRANSEN.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 15 aŭgusto.

LA SOLVOJ EL No 10-11.

brako
tablo
orelo
julio
leono

s o

s u n o

o n d o

o o

La premiojn gajnis : F.ino J. Dedieu, Prades (Franc.);

S.ro P. Dupe, Amsterdam (Ned.).



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

GROET (10-17 aŭgusto).

La nombro de partoprenantoj regule kreskas :

Venos : 70 Angloj, 12 Kimroj, 34 Francoj, 12 Belgoj, 1 Polo, kaj 65 Holandanoj.

Krome multaj plenkreskuloj deziras viziti Groet dum unu aŭ du tagoj por rigardi la unikan spektaklon : Tiom da infanoj el diversaj landoj, parolantaj unu lingvon.

Bezonajoj : Kunprenu : 1. katunan dormsakon kaj unu dikan aŭ du maldikajn lankovrilojn. Faru el ili kovrilsakon. Unu gvidantino el Anglujo demandis, ĉu ni povos zorgi pri kovriloj, ĉar estas malfacile kunpreni ilin. Ili pretas pagi luon. Nu, ni jam aĉetis 110 maldikajn kovrilojn. Ĉiu infano pagos nur unu ŝilingon kiel luprezon por du kovriloj. Ĉu eble aliaj ŝatas lui kovrilojn? Oni skribu.

II. Solidajn vestojn. Estas konsilinde kunpreni trikvoston. III. Fortikajn ŝuojn. IV. Tualetartiklojn (i. a. lavtukojn, sapon, k.t.p.). V. Banvestojn. VI. Malgrandan kalikon. VII. Precipe por la gvidantoj : Foto-aparaton. — La holandaj infanoj krome kunprenu pajlo-sakon kun kuseno.

Enlitiĝo : Je la deka. Ellitiĝo : Je la sepa horo.

Neniu rajtas paroli inter la deka vespere kaj la sepa matene, por ke ĉiu bone ripozu.

Pagoj : La organiza komitato urĝe petas, ke ĉiu pagu la kotizon antaŭ la 1-a de aŭgusto. Kiuj venos per aŭtobuso, pagu ankaŭ tiun sumon. La komitato ja mendis la aŭtobusojn kaj respondecas pri la mono.

Prospektoj : La partoprenantoj ricevas diversajn esp. prospektojn.

Bildkartoj : La komitato zorgos pri bildkartoj pri la diversaj lokoj, kiujn ni vizitos. Dum unu horo ĉiutage oni povas aĉeti ilin en la manĝejo. Tie troviĝas ankaŭ leterkesto. Ne eblas aĉeti kartojn dum la ekskursoj aŭ en Groet. Tio kaŭzus nur tempo-perdon.

Tre grave : La gvidantoj, kiuj venos kun grupo, tute respondecas pri sia propra grupo.

La eksterlanda karavano alvenos la 10-an de aŭgusto proksimume je la 5-a h. en Groet. La holandaj grupoj prefere venu iom pli frue por ŝtopi la pajlosakojn.

Bonvolu bone atenti la dancojn, kiuj aperis en la lastaj numeroj de „La Juna Vivo” kaj No 31 en „La Juna Vivo”-kantaro. Estas tre dezirinde, ke ĉiu partoprenanto jam antaŭe konu ilin !

LA EKSKURSO JE LA 15-a DE AŬGUSTO.

Foriro : je la 8-a kaj tridek minutoj.

Vojo : Schoorl, Bergen, Alkmaar, Stompeloren (vizito al la laktaĵfabriko), Schermerhorn, Midden-Beemster, Kwadijk, Purmer, Edam, Volendam (ni restos 2 horojn), Edam, laŭ la digo, preter Warder, Scharwou, Hoorn, tra la „Streek”, Enkhuizen (surprizo), Andijk, tra la „Wieringer-mar” al la ferm-digo ĉe Wieringen, de ĉi tie al la Nord-Holanda-Kanalo, laŭ la kanalo ĝis Burgervlotbrug, Petten, laŭ la „Hondsbosse” returne al Groet.

6a LISTO DE PARTOPRENONTOJ.

Anglaj knaboj : 138. Trevor Leslie Simpson (18 j.), 78 Somerford Rd. Weoly Castle, Birmingham 29; 139. George E. Smith (17 j.), 129 Hay Green Lane, Bourneville, Birmingham; 140. William J. Hardley (17 j.), 29, Tergn-mouth Rd. Bournbrook, Birmingham 29; 141. Clifford Mallin (18 j.), 2/256 King Edwards Rd. Hockley, Birmingham 18.

Ili ĉiuj tre deziras korespondi.

La gvidanto estos : 142. S.ro H. J. Morcombe, 30 Beech Rd. Bourneville, Birmingham 30.

Nederlandaj knaboj : 143. Rith v. Vlaardingen (15 j.), Nobelstr. 51b, Rotterdam C; 144. C. Vos, Burgerbrug B 55, Zype (N. H.); 145. Driehuis, Laren (N. H.); Arjen Pietjou, Achter de Hoven 14, Leeuwarden.

Nederlandaj knabinoj : 146. Annie Rasink (15 j.), Leuvenstr. 23, Leiden; 147. Catharina Rasink (14 j.), Leuvenstr. 23, Leiden.

FINANCA RAPORTO.

F.ino L. en Somain (Franc.) : f 3,75; P. S. en Purmer (Ned.) : f 5,00; N. K. en West-Grafdijk : f 2,50; J. D. v. d. E. en Santpoort (Ned.) : f 1,00; „Batalante Ni Venkos” en Gouda (Ned.) : f 20,70.

R. en Curacaŭ : f 2,50; N. K., West-Grafdijk : f 4,40; M. en Bourneville (Angl.) : f 1,50; B. en Stompeloren (Ned.) : f 10; K. en Knolledam (Ned.) : f 1,40; D. S., Beets (Ned.) : f 2,05; E., Edinburg (Brit.) : f 0,67; v. d. H., Rotterdam : f 2,50; B. W. en West-Grafdijk : f 2,50.

Restadmono : F. Meydam, Leerdam (Ned.) : f 2,50; F.ino Rees, Kimrujo : f 45,50; Corrie de Leeuw, 't Zand (N. H.) : f 7,50; F.ino Sheppard, Birmingham : f 51,62; P. Uvenhoven, Haarlem : f 5,00; J. Lyk, Breskens : f 2,50; J. de Kraker, Breskens : f 2,50; R. Laguna kaj C. Jansen en Bussum : f 5,00; F.ino Lepachelet en Somain : f 41,40; P. Krijt, Amsterdam : f 11,25; v. Veenendaal, West-Grafdijk : f 30,00; F.ino Edwards en Bishop Auckland : f 71,20; N. Tromp : f 5,00; Morcombe : f 26,00.



SKRIBA KURSO DE LA JUNA VIVO

„LA JUNA VIVO”-skriba komenckurso (nur por holandlingvanoj). 16 lecionoj, lernolibreto kaj vortareto. Prezo 0,95 guld. Senpaga korektado.

„LA JUNA VIVO”-daŭrigkurso, preparante por diplomo A. 25 lecionoj, legolibro, historilibreto kaj amaso da buŝaj ekzamendemandoj. Prezo : guld. 1,90. Senpaga korektado.

(Sen korektado oni pagas por ambaŭ kursoj nur la duonan prezon.)



RICEVIAJ ESPERANTAJĴOJ

PONTO AL LA PRAKTIKO, S. S. de Jong-W. Feenstra. Materialo por lego kaj traduko kun klarigaj notoj en la holanda lingvo. Kiel la titolo jam esprimas, la verketo estas tre taŭga „ponto” de la lernolibro al la legolibro.

Belaspekta, 61-paĝa broŝurita libreto. Prezo 0,50 guld. Mendebila ĉe „La Juna Vivo”.

SYSTEMATISK KURSUS i ESPERANTO (Sistema kurso de Esperanto), Seppik-Malmgren. Dua dana eldono. Laŭ la kvara sveda eldono prilaboris H. Grönborg kaj P. Möller. Eld. Laerer H. Grönborg, Risskov, Danujo.

LA JARLIBRO DE I. E. L. 1938. Neaĉetebila, sed ricevebla nur de individuaj membroj de I. E. L. Bazaj kotizoj : Membro kun jarlibro : 4 angl. ŝil.; MA : 10 ŝil.; MAH : 10 ŝil.; MS : 25 ŝil. Aliĝiloj haveblaj ĉe Int. Esp. Ligo, Herons-gate, Rickmansworth, Anglujo.

ANEKDOTOJ.

La malgranda Frico solvis en la lernejo la unuan kalkulproblemon. Hejme li fiere rakontas tion al la patrino.

„Panjo, se mi havas 4 pomojn, kaj mi ricevas ankoraŭ 2, tiam mi havas 6!”

„Tre lerte,” knabeto, „sed se vi havas 3 pirojn, kaj mi donas ankoraŭ 3, kiom da piroj vi tiam havas?”

„Ho, pri piroj ni ankoraŭ ne lernis.”

Joĉjo pasis kun la patro kaj la hundo buĉejon.

„Paĉjo,” li demandis, „ĉu hundo, kiu ŝtelis kolbason, tamen povas fariĝi polica hundo?”

Kuracisto : Ho aveto Tomaso, kial vi evitas min?

Tomaso : Pardonu, sinjoro doktoro, mi timis, ke vi koleretas pri mi, ĉar mi jam dum longa tempo estas tutsana.

Ĉar ni presigis malpligrandan kvanton de „La Juna Vivo”, ni ne povas bindigi la jarkolekton '37/'38. Oni do bone atentu ĉi tiun sciigon, por ke oni ne vane mendu la binditan jarkolekton '37/'38.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson ne pli grandan ol du linioj.

Francujo : Korespondadresojn de instruistoj aŭ knaboj petu de : Fino Dedieu, 13 rue de Belfort, Prades (P.r. Or.). Ĉiam validas.

Francujo : Marie-Thérèse Huart, rue de Lille, 10 jaraĝa, deziras korespondi kun proksimume samaĝaj knabinoj en ĉiuj landoj, p. ĉ. t.

Hungarujo : La grupo „Zamenhof” (14-19 j. knaboj) dez. kor. kun ĉ. l. geknaboj samaĝaj. Budapest, Vay Adám u. 5. Glück György. Resp. certa.

Nederlando : S.ro H. Hottinga, Primulastr. 8, Amersfoort, dez. kor. kun gekamaradoj en ĉiuj landoj. Respondo certa.

Nederlando : Kursanoj (lab.) en Hoorn dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. Adreso: M. v. Essen, Wydenes (N. H.).

Ned. Hindujo : Stanislas Soeharta, Instruisto de Ignatia lernejo, Pagaralam, Suda Sumatra, dez. kor. kun 16-30 j. gesamcelanoj en ĉiuj landoj.

Usono : Esp. klubo Junior High School, 171, 528 Ridgwood Ave, Brooklyn, N. Y., geknaboj 12-14 j. dez. kor. kun tutmondaj esp.istoj, filatelistoj.

Hungarujo : La Hungara Skolto Esperanto-Rondo, dez. kor. kun gejunuloj (prefere en : Japanujo, Finnlando, Azio). Budapest V, Nagy Sandor, U. 6.

Francujo : Guignot René, Oyonnax, Ain, deziras novaĵojn pri Jani Plass kaj Jozefo Tannebaum en Amsterdam.

Belgujo : Bogaert, Phil., 20-jara fino, Statiestraat 50, Buggenhout, dez. kor. perletere kun ĉiuj landoj.

Nederlando : La Esp. klubo „Volendam Viva” aranĝos letervesperon la 5-an de Aŭg. Adr. : H. L. de Hartog, Kathammerstraat 68, Volendam.

Francujo : Letervesperojn aranĝos la „Grupo de Esperantistaj Geinstruistoj” dum la Esp-o somerlernejo (4-29 de Aŭg. '38). Skribu multnombre por kuraĝigi la partoprenantojn. Respondo garantiata. Jam de nun sendu la leterojn al : S.ro Micard, Epineux-le-Séguin, Laval-Annexe (Mayenne).

Anglujo : Fervoraj anglaj gekursanoj de Guy B. Tordoff dez. kor. kun la tuta mondo. G. T. „The Folk House”, College Green, Bristol 1.

Nederlando : S.ro A. C. L. de Keizer, Middenstraat, 43, Sliedrecht, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝi poŝtmarkojn, k.t.p. Respondo certa.

Nederlando : S.ro G. ten Vaanholt en Hengelo petas respondon de : Keniti Hasegawa en Hokkaido (Japanujo), Gefratoj Freutsmiedl en Oberbuch (Germ.), kaj G. Rasmussen, Mosfelsfeit (Islando). Li sendis al ili poŝtmarkojn kaj ĝis nun ne ricevis interŝanĝekzemplerojn !

La sekvonta No de „La Juna Vivo” aperos en la fino de aŭgusto aŭ komence de Septembro.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto **S. Aarse**. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „**La Verda Stelo**”, Scheldestraat 64, Amsterdam-Z.

IO TAGA ESPERANTO-RESTADO EN „RY”, Danlando, 31/7—10/8 '38. Plena pensio 35-50 kronoj = 14-20 guld. Lastjare 160 partoprenantoj el 10 landoj. Senkosta prospekto ĉe **H. Grönborg**, Risskov, Danlando.

MUUSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. Libretoj 32-36 paĝoj po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvindantoj rajtas peti specimenon. Mendebila ĉe „**La Juna Vivo**”.

LA VOJO RETURNE (verkita de **Erich Maria Remarque**). Antaŭa prezo 4,50 guld. Nun : guld. 1,75 (bone bindita).

ROMANO PRI AFRIKA BIENO (de **Olive Chreiner**), unu el la plej rekomendindaj verkoj en la Esperanto-literaturo. Antaŭa prezo : guld. 3. Nun : guld. 1,75.

ĈU NOVA MILITO ? — JES... — KIAL ? Traduko de la nederlanda kontraŭmilita broŝuro : « Hoge hoeden en pantserplaten » de **A. den Doolaard**. 15 paĝa; enhavo kaj stilo tre rekomendindaj. Prezo : 15 cendoj (afrankite). Mendante 10 ekz. oni pagas po 10 c. plus 15 c. por afranko. Mendebila al „**La Juno Vivo**”.

KIAL VENDIGIS DUM UNU JARO 4000 „INTERNACIA LERNO-LIBRETO”J ? Jen la solvo : La metodo en „**La Juno Vivo**” estas bazita sur la realeco. 1. La memoro de infanoj estas bonega. Do multaj vortoj (proksimume 50 en ĉiu leciono). 2. La scio treege malrapide kreskas en la cerbo de infanoj. Do tre malmulte da gramatikaj malfacilaĵoj. Ankaŭ por simplaj homoj ĝi estas la plej taŭga metodo. **La prezo estas nur 0,20 guld.** Tuj mendu specimenon (20 c.).

VERAN TREZORON DE INTERNACIA LEGAJO enhavas la binditaj jar-kolektoj de „**La Juno Vivo**”. Antaŭa prezo 80 c. Nun **35 c. plus afranko.**

BILDO D.ro ZAMENHOF, formato 36×28.5 cm., tre bela, prezo **0,60 guld.** Prezo poŝtkartformato : **0,06 guld.** Mendebila al „**La Juno Vivo**”.

POR 20 CENDOJ oni ricevas 10 malnovajn ekzemplerojn de „**La Juno Vivo**”. Laŭplaĉe samajn aŭ diversajn.



KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO

En „**Gazeto do Sul**” (portugala ĵurnalo) aperis : „**Tiam**” („**L. J. V.**”, No 9, '38). En la portugalan lingvon trad. **Rasquinho Junior**.

En „**Nova Kambana**” (bulgara ĵurnalo) aperis : „**La Kuler-Forko**” („**L.J.V.**” No 4, 1936). En la bulgaran lingvon trad. **Bor. Simeonov**, Sofio.

Esperantistoj, daŭrigu ĉi tiun laboron. Estas bonega propagando por Esperanto. Sendu ĉiam ekz. de ĉiu revuo (ĵurnalo) en kiu aperis tradukaĵoj el „L. J. V.” al la red. en West-Graafthdijk.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe „La Juna Vivo”.

Nia Gazeto, monata	jara f 0,80	Esperanto-Internacia, mon.	jara f 2,50
Scienca Gazeto, dumonata »	f 1,50	Bulteno de I.S.A.E., dumo-	
Heroldo de Esp., semajna... »	f 6,80	nata	» f 1,53
Niaj Vizaĝoj, monata	» f 0,65	La Praktiko, monata	» f 2,50

Specimenoj : Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimenojn de aliaj gazetoj ni sendas (se en stoko) kontraŭ 5-cenda poŝtmarko.

La red. de „La Juna Vivo” neniel respondecas pri neregula apero de la supraj gazetoj !

PERANTOJ POR „LA JUNA VIVO”.

BELGUJO : H. Rainson, Hombeeksche stw., 54, Mechelen. Ĝironumero 335183.

BRAZILUJO : S.ino Maria Cêda de Morais, Rua 20 de Abril, 16, Rio de Janeiro.

BRITUJO : Brita Esp. Asocio, 142 High Holborn, London W. C. I.

BRITUJO : „Brita Lab. Esp. Asocio”, p/a S.ro Evans, 70 Hide Grove, Manchester 13.

ĈEĤOSLOVAKUJO : Ĉeĥosl. Esp. Asocio, Truhlarska, 16, Praha II. Poŝtĉekkonto 12.371.

DANUJO : Dansk Esperanto Institut, Adr. abonejo : S.ro C. Jensen, Musikhuset, Nykøbing F.

ESTONIO : Esperanto Asocio de Estonio, Tallin. Poŝtkast 6.

FRANCUJO : F.ino J. Lepachelet, 13 Place Victor Hugo, Somain (Nord). Ĝironumero : Lille 72.36.

HUNGARUJO : S.ro P. Balkanyi, Nagy Sandor-U, 6. Budapest V.

JUGOSLAVUJO : P. Golobič, Instruisto, Jesenice-Fuzine.

LATVUJO : F.ino Ludm. Jevsejeva, Riga, Reformatoru, iela 14, dz. 5.

MAROKO : S.ino Fink, 41 Bd Moulay Jousef, Casablanca.

NORVEGUJO : Norvega Esp. Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappelsgate, 5, Hamar.

POLUJO : Prof. Sygnarski, Kordeckiego 23, Budgoszcz.

SVEDUJO : Sveda Lab. Esp. Asocio, Barnfusgatan 8, Stokholm.

SVEDUJO : Eldona Societo Esper., Stokholm I, Box 698. Ĝironumero 578.

SVISUJO : R. A. Dasen, 19a avenue Riant-Parc, Genève. Ĝironumero 16256.

USONO : Amerika Esp. Instituto, 1111 Brooke Road, Illinois.

Subtenu la Internacian Junularlaboron !

Presejo A. Hessens, Bruselo.